W. F. A. MUDDE
AMSTERDAM

Prezo fl. 0,25 = 0,200 Sm.

KARAKTERO

LAŬ

Mr. J. M. VAN STIPRIAAN LUÏSCIUS,

ADVOKATO EN HAGO.

TRADUKITA LAŬ LA 5a ELDONO DE L' NEDERLANDA ORIGINALO.

□

HAGO — 1912 — LIBREJO „ESPERO"

Havebla ĉe Librejo „ESPERO", Prinsestraat 48, Hago (Nederlando):

Nederlanda Kantaro Esperantista.

10 belaj kantoj kun bone konataj holandaj melodioj, verkitaj kaj tradukitaj de

Fino N. BOON.

Prezo fl. 0.25 = 0.200 Sm.

Saluto al Belgujo

Poezio.

DE

H. MENALDA.

Muziko de F. DE MÉNIL.

Tiu ĉi eldonaĵo estis speciale farata por la *7a* Universala Esperanto-Kongreso de Antwerpen.

Prezo fl. 0.50 = 0.400 Sm.

KARAKTERO

LAŬ

Mr. J. M. VAN STIPRIAAN LUÏSCIUS,

ADVOKATO EN HAGO.

TRADUKITA LAŬ LA 5a ELDONO DE L' NEDERLANDA

ORIGINALO.

HAGO — 1912 — LIBREJO „ESPERO"

KSIĄŻNICA PODLASKA
im. Łukasza Górnickiego
Nr 1914
FILIA Nr 14
w Białymstoku

1

159.923 = 922

KARAKTERO.

Estas malĝoja vero, ke el mil homoj nur cent scias kio estas karaktero, nur dek havas karakteron kaj nur unu havas bonan karakteron. Tamen karaktero estas pli necesa ol pano kaj la homoj de bona karaktero formas la fundamenton de l' socio. Pro tio mi volas respondi la sekvantajn demandojn: 1e kio estas karaktero? 2e kiel formas oni karakteron? 3e el kio konsistas bona karaktero?

KIO ESTAS KARAKTERO?

Karaktero rilatas al homo kiel direktilo al ŝipo; ĝi estas nia vivkondukilo sur nia vivmaro. Ĝi estas nia konstanta volo aranĝi nian faradon kaj detenadon laŭ antaŭe decidita plano. Ĝi estas nia principo aplikita al nia vivo. Ekstere ĝi estas tio, kio distingas nian faradon kaj detenadon de tio de aliaj, kaj interne tio, kio difinas nian faradon kaj detenadon. Ĝi estas la en detaloj plenumita ĝenerala devo, kiun ni altrudis al ni mem.

Distingilo de l' karaktero estas la konstanteco. Ne ĉiu, kiu persistas, havas karakteron, sed ĉiu, kiu havas karakteron, persistas. En la princippersistado kuŝas la karaktero. „La persistanto gajnos" estas la devizo de ĉiu homo kun karaktero. „Ĉio alvenos ĉe tiu, kiu scias atendi", estas la ĝusta konsolmotivo por ĉiu, kiu havas karakteron. „Neniam cedi kaj neniam malesperi"; „ne nur labori sed ankaŭ atendi", „kiam la defluo estas plej malproksima, la alfluo estas plej proksima" estas la devizoj de ĉiu karaktero.

La granda Amerika verkisto pri karaktero, O. S. MARDEN, faras la sekvantan rakonton pri manko je persisto. „Iam estis videbla, dum foiro en Skotlando, modelo de riĉa ormino. La komencanto de tiu mino estis elspezinta milionojn kaj post unu kaj duona jaro forlasis la esperon trovi oron kaj vendis la minon por bagatelo. La nova posedanto fosigis plue kaj trovis riĉan orkanalon la unuan tagon!" Tiel la oro de l' vivo povas esti tre proksima de la senkuraĝigitoj.

Karaktero nobligas. Nek la imperiestro, nek la reĝo, nek la

ministro, nek la parlamentano, nek la naskiĝo, nek la mono, nek la mieno povas doni al iu la veran nobelecon, sed tion oni mem nur povas fari formante noblan karakteron. Karaktero estas la plej bela dekoraĵo, bona karaktero estas la vera nobeleco. Bona karaktero estas pli bona ol bona kariero, ĉar la unuan oni ofte havas pro merito kaj la duan oni ofte havas pro favoro. Karakternobeleco estas la vera nobeleco.

Karaktero estas pli alta ol prudento. Parteto de karaktero estas pli ol monto de prudento. Koro valoras pli ol kapo. Kondukado staras pli alte ol la scio kiel kondukadi. Bona prudento tre multe valoras, sed bona karaktero senfine pli valoras. „Se scio povon donas, karaktero faras la viron estimata" iam diris Nederlanda profesoro. Karaktero pravigas konfidon kaj estimon, prudento povas akompani malbonecon. Karaktero kaj prudento ne staras sur la sama vico.

Karaktero estas kontrasto al eksteraĵo. Agrabla eksteraĵo estas fonto de profito. „La unu povas ĉevalon ŝteli, la alia ne rajtas transvidi barilon" estas vera proverbo. Agrabla eksteraĵo malfermas ĉiujn pordojn, sed bona internaĵo malfermas la korojn. Eksteraĵo altiras, sed internaĵo ligas. Agrabla eksteraĵo donas konatojn, bona internaĵo donas amikojn. Agrabla eksteraĵo ofte kondukas al riĉeco, bona internaĵo ĉiam al feliĉo. „Kvieta konscienco estas ĉiutaga festo", ankaŭ por ekstere malfavorigitoj.

Karaktero pli valoras ol mono. Iom da mono estas necesa kaj ofte malfacile akirebla, sed multa mono estas danĝera. Multa mono povas esti malbeno aŭ beno, laŭ tio kio estas la karaktero. Por mono oni povas multe aĉeti, sed ne la plej multekostajn aferojn. Amo, amikeco, altestimo kaj memkontentigo (ne parolante pri saneco) ne estas aĉeteblaj por mono, sed jes por karaktero. Per karaktero oni povas fari pli da bono ol per mono. Rideto, saluteto, manpremo, konsilo, alkuraĝigo, afabla vorto pli valoras ol mono.

Ĉiu karaktero estas memstara; ĝi estas sendependa; ĝi agas laŭ propraj komprenoj; ĝi ne deziras protekton; ĝi apogas nur sur si mem sola. Ĝi enradikiĝas en devokonscio, sed ĝi vivas en libereco. Karaktero lasas ĉian kredon netuŝita kaj povas harmonii kun ĉia religio, sed ĝi iras laŭ nenies kondukilo. Ĝi plenumas la de aliaj altruditan devon, sed inter

la limoj de propra devo. Ĝi respektas la komprenojn de aliaj kaj aŭskultas konsilon, sed decidas mem. Karaktero ne toleras kundirektanton apud si mem.

Karaktero estas la memkreita animpropreco de l' homo; ne la animpropreco, kun kiu li naskiĝis, sed kiel ĝi estas disvolvita de ĝi mem aŭ sub influo de ĝiaj gepatroj aŭ vivospertado. Karaktero estas nia ĝenerale memaltrudita devo, t. e. nia ĝenerala volo, kiu formas la konstantan ĉeneron inter nia individueco kaj nia speciala volo en ĉiu difinita okazo. Gramatike karaktero signifas: rekonilo, sed oni celas per karaktero: nia konstanta ĝenerala volo.

KIEL FORMAS ONI KARAKTERON?

Por karakterformado unue estas necesa la scio, ke ĉiu estas la faranto de sia propra sorto; la konvinko, ke ĉe nia celado al sukceso ne ekzistas hazardo; la certeco, ke kiu bonon faras bonon rekontos kaj ke fine ĉiu justa afero venkos; kaj la firma kredo, ke per animforto, memregado, pacienco kaj persistado ĉiuj obstakloj ŝanĝiĝas en ŝtuparoj al feliĉo kaj ĉiu kontraŭstaro ŝanĝiĝas en kunlaboro. Kiu serioze volas sukcesi, sukcesos!

Due por karakterformado necesas la konscio, ke estas multo, kion oni povas lasi aŭ fari, kvankam oni mem ne scias tion; la konscio, ke, kiam oni nur volas, oni povas fari pli ol nun, kaj sur tiu tereno de nia povado kuŝas antaŭ ni nemalkovrita mondo; la konscio, ke oni nenion starigas aŭ atingas, kiam oni, kiel iam diris ministro de justicio, sin limigas ĉe la konjugado de l' verbo ne-povi; unuvorte: memkonfido, apogi sur propra forto sen memtrotaksado.

Trie por karakterformado necesas: spiritforto aŭ energio. Kiu havas spiritforton, pro tio ne havas karakteron, sed sen spiritforto oni ne formas karakteron. Granda spiritforto necesas por kondukigi sian volon per principo kaj tre granda spiritforto necesas por persisti en tio. Spiritforton oni obtenas per ekzercado, per ripete provi kio estas maloportuna al vi kaj per ofta ŝtrecado de ĉiuj fortoj de la celado al definita fincelo. Spiritforto sen karaktero estas danĝera.

Por havi sufiĉan spiritforton, oni devas posedi sanan spiriton

en sana korpo. Por tio necesas, ke oni estu kiel eble plej ĉasta kaj pro tio, kiel eble plej multe, promenu kaj estu modera pro nutraĵo kaj ripozo. Sir JOHN LUBBOCK, la angla verkinto pri karaktero, diris: „la riĉulo, kiu volas esti sana, devas vivi kiel malriĉulo". La homo, kiu volas apogi je propra forto, devas esti penetrita de la penso, ke per ĉasteco li povas konservi sian sanecon, kaj ne esti sklavo de l' ĝuado.

Kvare por karakterformado necesas la edukado de bonaj kutimoj. „Semu faron kaj vi rikoltos kutimon; semu kutimon kaj vi rikoltos karakteron; semu karakteron kaj vi rikoltos vivosorton", instruas al ni la cititaj verkistoj. La kutimo grade fariĝas dua naturo kaj tion tuŝas la karakterformado. Bonaj kutimoj ne estas necesa substanco de bona karaktero, sed ili estas tre bona rimedo por formi karakteron.

Kvine kaj sese por karakterformado necesas laboremo kaj pasivemo. En la fandujo de l' laboro kaj sufero karaktero formiĝas. „Malsupreniru la deklivon de l' laboro, tra la akvo de l' sufero; ne ekzistas alia vojo!" Kiu volas trairi la arbaron, devas trairi la boskon. „Kiom povas vi elporti? kiom povas vi atendi?" estas la demandoj farataj al ĉiu komencanto sur la vojo de l' karakterformado. Kiu ne laboras kaj ne suferas, ne povas formi sian karakteron. En la konkurso de l' vivo, la karakterformanto vidas centojn preterrapidantaj, kiuj penadas multe malpli ol li. Li laboras, dum ili festas, dormas aŭ prenas vakancon. Li restas malalte ĉe la tero, dum ili ŝajne leviĝas. Li suferas, dum ili ŝajne sukcesas. Sed li faras el si mem, per sia laboro kaj sufero, fortan individuon, kiu povas elporti malsukceson kaj restas staranta kiam liaj preterrapidintoj jam estas delonge falintaj. Neniu karaktero sen batalo.

Sepe kaj laste por karakterformado necesas principo, t. e. memaltrudita devo, destinita por daŭri dum la vivo. Tiu devo povas esti diversa. La elekto de principo estas la plej grava elekto, kiun oni faras en sia vivo. Sed kiam tiu elekto estas farita post matura pripensado, oni devas (se oni ne rimarkas esti erarinta) dum sia tuta vivo resti fidela al sia principo. La apliko devas okazi kun prudento kaj uzo de l' lecionoj el la spertado. Oni povas esti kiel eble plej bona kaj samtempe kiel eble plej prudenta. Ne por ĉio oni

devas subteni principon, sed unu principon, laŭ kiu oni aranĝas sian vivon.

EL KIO KONSISTAS BONA KARAKTERO?

Bona karaktero unue konsistas el:

BONVOLECO.

Estas du specoj de homoj sur la mondo: egoistoj kaj altruistoj. Egoistoj estas homoj, kiuj vivas por sia propra intereso; altruistoj estas homoj, kiuj vivas por la intereso de aliaj. La unuaj estas la plej multaj, la lastaj la plej bonaj. Homoj, kiuj vivas por la intereso de aliaj, havas kiel principon: bonvoleco. Pro naturo ĉiuj homoj estas egoistoj; edukado aŭ memedukado faras altruiston. Bonvoleco aŭ altruismo tute ne eligas zorgon por propra intereso, sed la egoisto zorgas por tio kiel eble plej multe kaj la altruisto zorgas por tiom kiom necesa. Oni devas zorgi por propra ekzistado.

Por povi zorgi por aliaj, oni devas komenci zorgi por si mem. Zorgante por si mem, la altruisto nerekte zorgas por aliaj. Sed kion oni ne bezonas fari por si mem, oni faru por aliaj. Nenio tiel rekompencas sin mem kiel bonvoleco. Kiu volas esti feliĉa, devas klopodi fari aliajn feliĉaj. Antikva rimeto diras: „Ho, se ĉiuj homoj estus saĝaj kaj bonfarus, la tero estus paradizo, sed nun ĝi ofte estas infero". Geedzeco estas ĉu paradizo ĉu infero, kaj nur tiu geedzeco estas feliĉa, en kiu la geedzoj estas bonvolaj. Nur inter bonvolaj homoj povas ekzisti amikeco.

Bonvoleco teorie estas tiel facila kaj en la praktiko tiel malfacila. Ekzistas malmultaj aferoj tiel malfacilaj kiel bonfarado. Inter la limoj de niaj fortoj kaj ekster la limoj de niaj bezonoj plenumi la bezonojn de aliaj, estas pli facile dirita ol farita. La malfacileco kuŝas en tio, ke oni ne konas la bezonojn de aliaj. Sed kie estas la volo, tie estas la vojo kaj malfaciłaĵoj ekzistas por esti venkataj; ju pli granda la batalo, des pli bela la venko! BISMARCK iam diris, ke la celo estu sana egoismo; sed ĝi estu sana altruismo. Estas malsana altruismo, se oni plenumas la bezonojn de aliaj, kiujn ili mem povas provizi. Tiam oni senigas ilin de l'

precioza kompreno de l' „helpu vin mem". Ĉiu devas helpi sin mem en la plenumo de siaj bezonoj, sed kie li ne povas fari tion, aliaj devas helpi lin. Tio estas la vera bonfaremo; helpi nebezonantojn estas malsana filantropio. Ekzemplo de sana altruismo estas la zorgo de l' patrinoj por siaj junaj infanoj, zorgo, kiun ni retrovas tra preskaŭ la tuta bestregno. Estas preskaŭ nekredebla per kiel diversaj manieroj oni povas imiti tiun ekzemplon. La plej malriĉa homo ne konscias sian riĉecon, kaj la homo plej bezonanta ne scias kiel ajn li kelkfoje povus helpi iun. Kiu per la lanterno de l' ĝentileco serĉas homojn, kiuj havas bezonojn, kiujn ne ili, sed li povas plenumi, estos surprizata de sia trovo.

Oni devas ne sole kontraŭ homoj, sed ankaŭ kontraŭ bestoj esti bonvola. La individueco de besto estas precize la sama kiel tiu de homo; la diferenco konsistas nur el la loĝejo de l' individueco. La bestoj ne povu paroli kaj malpli bone pensi, ili estas egale percepteblaj por sufero kiel la homoj, kaj ankoraŭ pli percepteblaj por angoro ol la homoj. Krom buĉado por nutrado kaj mortigado por defendado, ĉiu manko de bonvoleco kontraŭ bestoj estas granda karakter-eraro.

Ne ĉiam la zorgo por aliaj kaj la zorgo por si mem povas kuniri, kaj tiam la lasta devas cedi. Ĉe malfeliĉoj kaj naciaj akcidentoj, la bonvoleco tute okupas la homon kaj alprenas la formon de memofero kaj senintereseco. La devo de l' amo por la najbaro tiam ne permesas propran subtenadon kaj vivi por la patrujo tiam ŝanĝiĝas en morti por la patrujo. La beleco de l' bonvola karaktertrajto tiam tute aperas.

La regno de l' imago liveras al ni belan ekzemplon de memofera amo. DICKENS skizas en sia mastroverkaĵo la amemon de DAVID COPPERFIELD al malgranda DORA, „la infanvirineto" kaj AGNES, kun li edukita kiel fratino, faras laŭ lia peto ĉe ŝi sukcesplene bonan parolon por li. Kiam COPPERFIELD estis vidvo, li konsciis sian amon por AGNES, kaj ŝi, kiu estis helpinta lin feliĉiĝi je la kosto de ŝia propra feliĉo, esprimis tion en sia respondo al lia ampeto: „mi amis vin dum mia tuta vivo". Tiel ni devas vivi por aliaj; se povas kun zorgo por propra feliĉo, se ne povas, sen ĝi! Tiel ni devas montri la noblecon de nia karaktero! Ne por akiri la feliĉon, sed por meriti la feliĉon, ni devas esti bon-

volaj. Ne pro riĉeco, profito aŭ honoro devas ni apliki tiun unuan principon de bona karaktero, sed por altenteni la nuran idealon, kiu levas nian vivon super la ordinaro.

Ne la faro, sed la principo altigas. Prave ni admiras la viron, kiu kun ofero de propra vivo, savas la vivon de la samhomo, sed la vera grandeco estas ĉe tiu, ĉe kiu tiu faro estas la premio de tuta vivo de bonvoleco, kiu vivo, nerimarkite pasinta, ankaŭ sen tiu okazo de memofero, verŝajne meritas la plej altan estimon. La malbonuloj povas havi noblajn impulsojn kaj, kvankam oni ilin aplaŭdas, la nobla volo staras pli alte. Altruista vivo staras pli alte ol altruista faro.

Bonvola vivo pagas sin mem, sed ne per la mono, kiun serĉas la egoisto, kaj ne per tio, kion li nomas sukceso. La plej alta rekompenco por tia vivo estas estimo kaj konfido, kaj, kiel SAMUEL SMILES esprimis: „homoj de bona karaktero povas esti metitaj de kelkaj en maljusta lumo, de aliaj malprave komprenataj; malfeliĉo kaj malsukceso povas ilin kelktempe surprizi, sed per pacienco kaj persistemo ili fine eldevigos la estimon kaj la konfidon, kiujn ili vere meritas".

Ŝajnas tie ĉi la loko memorigi kion skribis la granda moralisto EMERSON pri karaktero kaj bonvoleco. „Karaktero laboras ankaŭ sen rimedoj, sole per sia ĉeestado". „En la homo de karaktero estas io pli bela ol ĉio kion li diras". „Homoj de karaktero estas la konscienco de l' socio. Ili metas sin super la cirkonstancoj". „La vera bonvoleco ne povas esti mezurata laŭ sia laborado. Ĝi estas neelĉerpebla kaj kiam ĝi ne plu povas fari ion, ĝi ankoraŭ instigas. La plej longa listo de bonfaroj estas mallonga kompare vivo de bonvoleco". La bonvoleco devas gvidi nin ankaŭ ĉe la elekto kaj ĉe la praktiko de nia profesio. Oni ne devas elekti tian profesion en kiu oni vidas la plej bonan gajnon, sed tian, en kiu oni vidas la plej bonan okazon por fari sin mem utila. Ĉiu devas esti pli granda ol sia profesio konsiderante ĝin kiel okazon por bonfari. Kie estas utila laboro, la gajno sekvas per si mem; kiu faras sin utila, estos utiligata. Ankaŭ oni neniam devas deziri la profesion de iu alia, sed ĉiam plibonigi sian propran profesion. Nia idealo devas esti: kiel eble plej multe fari sin utila en utila profesio; nur tiu, kiu plenumas tion, estas sukcesinta.

Bonvoleco povas kuniri kun vera ambicio, sed ne kun falsa

ambicio. Vera ambicio estas la deziro esti farinta sian devon dum sia tuta vivo, la deziro subteni vivon senmakulan, la sopiro esti nesubaĉetebla, neniam iun flati, ne riĉigi sin je la kostoj de aliaj kaj neniun trompi per kio ajn, unuvorte meriti kaj postlasi bonan nomon. Falsa ambicio estas la tendenco plenumi altajn oficojn, ankaŭ tiujn, pri kiuj oni ne posedas la kapablon aŭ por kiuj oni ne havas tempon, kaj ŝajnigi kio oni ne estas.

Bonvoleco kuniras kun liberecamo, sed ne kun troigita liberecamo. Liberecamo estas la sopiro obei nenion ol la memaltruditan devon. Troigita liberecamo estas la sopiro nenion aŭ neniun obei, eĉ ne la memaltruditan devon. Oni ne lasu sin devigi de nekompetentuloj, sed oni devigu sin mem al helpado. Bona karaktero dankas sian naskiĝon ne sole al la sopiro al sendependeco, sed ankaŭ al la sopiro helpi aliajn.

Bonvoleco devas kuniri kun honorsento. La bonvolulo ne devas ĉion atendi. Li ne devas atendi kio malpliigas lian estimindecon. Sed honorsento ne devas degeneriĝi en ekscitebleco aŭ kulpigemo. Oni ne devas konsideri ion kulpa kio ne estas dirita kun la celo ofendi. Prezentatajn ekskuzojn oni devas akcepti kiel eble plej multe. Oni ne bezonas respondi ofendon per provoko. Oni ne plu parolu al la ofendinto. Se necese, oni forlasu lian societon. En la plej ekstrema okazo oni faru alvokon al honorjuĝantaro aŭ, se tio ne estas ebla, al la juĝisto.

Ne sole kontraŭ fremduloj, sed ankaŭ kontraŭ samdomanoj oni estu bonvola. Kelkaj homoj estas eksterdome la bonvoleco mem kaj hejme la nebonvoleco mem. Aliaj homoj estas en hejmo bonvolaj, sed ne eksterdome. Ankoraŭ aliaj estas bonvolaj la unu tagon, sed ne la alian. Oni estu kiel eble plej bonvola, kie kaj kiam ajn. Se prefero ĉe la montrado de bonvoleco estas necesa, oni preferu propran rondon. La vera bonvoleco komencas hejme.

Kiu konstante banas en la fluo de bonvoleco, liberigas sin per tio de nombrego de mankoj. La bonvolulo ne hipokritas, ne rompas sian vorton, ne estas falsa, ne trompas, ne ofendas, ne vundas, ne mortigas (aŭ nur pro devo aŭ memofendo), ne estas malhonesta, parasita, havema, plaĉema, ĵaluza, obstina aŭ malamema. Oni ne povas postuli, ke vi sentu

amon por ĉiu, sed oni ja povas postuli, ke vi traktas ĉiun afable. En la krono de homaj virtoj plej brilas la ŝtono de l' bonvoleco. Bonvoleco estas la plej alta justeco.

Bona karaktero due konsistas el:

ĜENTILECO.

Ĝentileco rilatas al bonvoleco kiel la fruktŝelo al la frukto mem. Sen bonvoleco, la ĝentileco havas malmultan valoron. Sen ĝentileco, la bonvoleco ne havas sian plenan valoron. Ĝentileco estas la formo, dum bonvoleco estas la enhavo. Per bonaj manieroj, la bonvolo trovas sian vojon. Sensignifaj manieroj estu neniam, bonvolaj manieroj estu ĉiam aplikataj. Maniereco servas por teni iun je distanco, ĝentileco servas por plezuri iun. Ne sole per vortoj, ankaŭ per faroj oni estu ĝentila. Amikeco ne elfermas ĝentilecon. Ĉiu devas esti ĝentila; por ĝentileco neniu staras tro alte aŭ tro malalte. Oni estu ĝentila kontraŭ ĉiu; por ĝentila traktateco neniu staras tro malalte. Kontraŭ maljunaj sinjoroj kaj kontraŭ sinjorinoj, eĉ kiam ili estas pli junaj, oni devas esti ekstreme ĝentila. Malĝentila traktateco ne forprenas la devon de l' ĝentileco.

Bona karaktero trie konsistas el:

DEVOKONSCIO.

Devokonscio estas la scio, ke oni devas obei al tio, kion vi ordonas al vi mem aŭ alia al vi. Estas la akso ĉirkaŭ nia karaktero turniĝas. Estas la fonto, el kiu naskiĝis nia karaktero, muĝante en nia karaktero. Estas la apliko de l' granda ordono: faru kion vi devas fari, kio ajn rezultu el ĝi. Ĝi donas la preferon al propra ordono, sed direktas sin, kie tio ne povas, tute laŭ la ordono de aliaj. Ĝi kaŭzas, kie estas agata en servo de aliaj, memvolan aplikon de subuleco. Sen devokonscio, civilizita socio estas neebla.

En iu senco, ni ĉiuj estas subuloj, subuloj de l' leĝdonanto. Kie ni ne ĉiuj povas fari nian devon laŭ propra kompreno, tie ni devas sekvi komunan regulon. La distingo

inter la homo kun devokonscio kaj la homo sen devokonscio estas, ke la unua memvole sin submetas al la leĝo, la dua nur pro timo por puno. Por multaj estas beno devi aŭskulti al fremda ordono. Ĝi instruas ilin aŭskulti propran ordonon. Ĝi instruas ilin, ke ekzistas io pli alta ol „la rajtoj de l' homoj": la devo de l' homo!

Kvare apartenas al bona karaktero:

MODESTECO.

Tio ĉi estas tiel vera, ke, kiam oni prezentigus pedantulojn en kinematografo aŭ imitus ilian afektitan voĉon en gramofono, ili mem ekridus. Se oni honorus iun nur pro lia merito, pedanteco baldaŭ formortus. Korteganaroj, dekorajoj kaj flatoj kaŭzas multan malbonon sur tiu ĉi kampo.
Nenio pli ridinda en la mondo ol pedanteco. Nenion oni povas motive fieri ol bonan karakteron, sed, se oni fieras ĝin, la merito je ĝi malvaloras. La pedantulo fieras sian konon, sian nomon, sian titolon, sian oficon, sian devenon, la meritojn de siaj praavoj, siajn konatojn aŭ sian mienon, sed forgesas, ke ĉio tio ne rilatas al lia merito. Se la pedantuloj scius kiel ĉiu travidas kaj ridas ilin, ili ne plu estus pedantuloj. Altaj oficoj estas danĝeraj por la karaktero, ĉar ofte ili forprenas la modestecon. La pedantulo kredas, ke li pligrandiĝas kiam li pli alten grimpas. Li forgesas, ke nur sia piedestalo pligrandiĝas.
Ofte estas malsaĝeco sin kredi pli lerta ol aliaj. Precipe ĉe bonuloj, la kono ne tiel baldaŭ aperas. Multaj estas pli kleraj ol ili ŝajnas. Oni ne forĵetu sin, sed oni ankaŭ ne antaŭenmetu sin. Plej bona rimedo kontraŭ pedanteco estas interkomunikado kun aliaj. Soleco edukas grandajn pensantojn, sed ankaŭ pedantulojn.
Modesteco devas kuniri kun memrespekto. Eĉ kun la plej granda modesteco, oni ne toleru al si malaltigojn. Neniel oni deprenu ies memrespekton. Oni ne havu tro grandan takson de siaj kapabloj, sed oni ankaŭ ne forĵetu sin. Se vi forĵetas vin, neniu ekstarigos vin. Kiu perdis la memrespekton, malhavas ĉion. Nia tuta vivo devas esti aranĝita

por obteni tiun estimon. Memrespekto ne degeneriĝu en memŝateco.

Kvine apartenas al bona karaktero:

DANKEMO.

Tiu ĉi propreco estas malofta kaj tamen nedankemulo estas malbonulo. La plej multo el la homoj promesas orajn montojn antaŭe kaj klinas sin pro tio kiel lakeoj, sed, kiam la bonfaro aŭ servo estas plenumita, la promeso estas forgesata kaj la klinado ĉesas. Pruntedonu al amiko, vi admonos malamikon. La posedanto de bona karaktero ne celas dankemon kaj ne timigas sin per maldankemo; tamen estas granda eraro esti maldankema. Maldankemo perfidas la egoiston. Kiam ni devas montri bonvolecon al iu, kiu ne montris bonvolecon al ni, kiom des pli ni devas montri tion al tiu, kiu jes faris tion! Oni ne dovas flati siajn bonfarantojn, sed rekono de faritaj servoj ne estas flatado.

Sese apartenas al bona karaktero:

TAKTO.

Takto kaj lerteco estas la sentiloj de l' civilizita homo. Sen perfido al sia propra principo, oni povas fari la samon per pli delikata maniero. Akra vorto neniam estas bezonata. Respekton por ies konvinko oni ĉiam bezonas. Tute ne necesas ĉiam esti prava kaj ne ĉiam decas deziri la lastan vorton. Por ne esti jesulo, ne estas necesa ĉiam kontraŭdiri. Oni ne bezonas esti blinda por la malbono, por vidi la bonon. Oni ne povas ĉion malkonstrui sen iam ion konstrui. Silenti kaj aŭskulti estas ĉiam pli bona ol paroli. Ne estas brava iun ofendi nenecese kaj oni pli obtenas laborante kun takto. Estas malĝusta nenecese sentigi vian superecon kaj plejofte servas al nenio vidigi al via kontraŭstaranto lian subecon. „Pli bona perdi vian argumenton ol perdi vian amikon", diris LUBBOCK. Takto ne devas degeneriĝi en flatemo, kiel

ĉe homoj, kiuj unue kontraŭdiras kaj poste konsentas; sed ĝi ne devas forresti kaj fari spacon al krudeco. Neniam oni diru kion oni ne opinias, sed tute ne ĉiam oni diru kion oni jes opinias. Neniam oni oferu iun al spritaĵo, kaj personaj spritaĵoj ne plu estas amuzaj. Obstineco ne perfidas posedon de karaktero, sed manko de takto; tre bone oni povas agi laŭ propaj opinioj kaj antaŭe preni noton el la opinioj de aliaj. La prudentulo aŭskultas konsilon.
Takto povas kuniri kun honesteco. Ekster la scenejo oni ne ludu komedion, sed ne ĉiam oni montru sian plej ombran vizaĝon. Oni neniam prezentu sin alia ol oni estas, sed oni ne povas ĉiam sin montri kia oni estas. Timetecon oni ne kovru per brutaleco. En la ĉeesto de aliaj, oni ne malkovru al siaj amikoj aŭ servistoj iliajn erarojn, kaj al fremduloj oni neniam malkovru iliajn mankojn. Oni gardu sin nenecese diri al malsanulo, ke li estas neresanigebla.
Al bona taktiko ankaŭ apartenas, ke oni plenumu ĉiujn siajn interkonsentojn kaj ke oni ĉiam venu ĝustatempe. Princoj ĉiam venas precize je la anoncita tempo; ni ĉiuj tiurilate prenu ilin kiel modelojn. Oni diras, ke la granda mondo ĉiam igas atendi al si, sed kiu bone konas sian mondon ne faras tiel. Interkonsento, se ĝi estas bona, estas sankta, kaj kiu ne volonte atendas, ankaŭ ne igu atendi alian. Per malfrua veno oni malkomplezas nenecese. Pro ĝustatempa venado oni rekonas la „gentleman".
Ĉe la plej bonaj intencoj apartenas granda dozo da takto. Tion oni plej bone rimarkas en la ĉiutaga interrilatado. Estas homoj, kiuj ĉiam parolas, tio estas ankoraŭ pli enuiga ol ĉiam silenti. Estas homoj, kiuj ĉiam demandas; tio proksimiĝas al malmodesteco. Estas homoj, kiuj ĉiam konsilas; tio pensigas al la misiulo, kiu pro tio estis formanĝata de l' sovaĝuloj. Estas aferoj, kiujn oni ofte al si mem, sed malofte al aliaj diru. Fine oni ĉesu konsiladi kaj preferu doni bonan ekzemplon. Oni povas esti bona sen enuigi.
Takto estas la granda arto plenumi maldolĉan taskon laŭ dolĉa maniero. Pensu akre, sed parolu delikate. Ne faru peton al kiu estas en malbona humoro. Ne parolu en koleremo. Ne parolu nenecese malbonon pri forestantoj. Ne trograndigu; ne estu tro decidema. Ne ĉion prijuĝu, ne malaprobu ĉion. Lernu toleri ŝercon kaj kontraŭdiron. Ne kon-

sideru ŝeĝkrakadon kiel tondradon. Malhelpu neniun. Ne faru nenecese malamikojn. Klopodu amuzi, kie vi ne amuzas vin mem. Ne altrudu vin. Ne estu afektita. Ne estu rigida. Ne estu nenecese formala. Ne estu scivolema. Ne parolu kaj ne pensu pri vi mem. Neniam diru dufoje la samon al, aŭ en ĉeesto de, la sama persono. Ne malkomplezu nenecese. Ne kondamnu antaŭ ol vi estas kompreninta. Estu severa por vi mem kaj indulga por aliaj. Cedu kion vi laŭracie povas cedi. Doni al ĉiu kio apartenas al li, ne flatante iun, jen la sekreto de takto.

Sepe apartenas al bona karaktero:

MEMREGADO.

Por multaj tio ĉi estas la plej malfacila propreco, ĉar la saneco en tio ludas grandan rolon. Kvietaj homoj per tio havas superecon. Tamen estas absolute certa, ke ĉiu per konstanta ekzercado kaj per sana vivmaniero povas akiri memregadon. Oni devas komenci kiel eble plej malmulte koleretiĝi kaj kiam oni ekkoleras plej malmulte fari kaj plej multe silenti. Manko de memregado povas malbonigi la plej belan estontecon.
Precipe kontraŭ subuloj oni devas apliki memregadon, ĉar ili ne rajtas kontraŭdiri. Kontraŭ infanoj estas eĉ nepermesata ne konservi sian memregadon. La plej bona maniero lerni memregadon estas, ke oni pripensu, ke post sia kolereco oni ja devas reboniĝi. La provilo de kompleta memregado estas tie, kie oni estas malhelpata en sia laboro. Ne estas firma respondi maldecaĵon tuj per maldecaĵo, sed estas firma tiam silenti, kaj, se necesa, poste dece respondi.
Ekzistas homoj, kiuj havas la inklinon, intence aŭ senintence, fari, ke iu perdu sian memregadon, sed tiam la memregado devas tamen ekzisti; ja estas la plej bona maniero ĉesigi la incitetadon. En pasinta tempo oni ekspozis la frenezulojn en la institutoj kaj incitegis ilin en iliaj kaĝoj; nun oni konscias havi antaŭ si malsanulojn. La konstantaj tedantoj meditu, ke ili ludas la rolon de incidantoj, kaj la incitatoj

montru, ke ili estas prudentaj homoj, kiuj ne lasas sin konduki al malfeliĉo aŭ krimo pro manko de memregado.

Oke apartenas al bona karaktero:

PRECIZECO.

Unu afero estas pli grava ol la alia, sed ne ekzistas malgravaj aferoj. Advokato MONTIJN finas sian akademian disertacion per jenaj vortoj: „Ĉe la esplorado de l' fontoj, nenio ŝajnu malgrava por nia interesateco: nur donante atenton al ĉio, povas evidentiĝi al ni, kio meritas ĝin pli-malpli". Kion tiu ĉi juristo diras pri la esploro de fontoj, valoras por ĉiu laboro; nenio estas tro malgrava por nia interesiĝo.
Ekzistas ja bagateloj, sed ne malgravaĵoj. La plej malgrandaj kaŭzoj kelkfoje havas la plej grandajn sekvojn. Unu malĝusta paŝo povas irigi sur malĝusta vojo. La dunoj, kiuj haltigas la maron, konsistas nur el sableretoj. La mieno de l' homo estas malgravaĵo, sed tute ne devas esti negliĝata. Oni estu simple, sed nete vestita. Neteco ne estas vanteco. Pureco estas devo. Ordo kaj reguleco estas malgravaĵoj, sed la mastrumado sin apogas sur ili.
Malgranda kaj granda estas nur relativa. Se oni konsideras, ke unu akvero estas mondo de vivantaj estaĵoj, kiel ni estas grandaj! Se oni konsideras, ke nia tuta tero estas nur punkteto en la universo, kiel ni estas malgrandaj! Kio hodiaŭ estas granda, morgaŭ povas esti granda. Ni ne povas liveri bonan laboron, se ni ne atentas la malgrandaĵojn. Ni ne estas bonaj, se ni ne plibonigas ankaŭ niajn malgrandajn mankojn. Ni ne devas lasi la plej malgrandan okazon, ĉar ĝi povas esti la fonto de tre granda feliĉo. La vivo konsistas el bagateloj, sed oni povas liveri grandajn servojn per bagateloj.
Le precizeco postulas, ke oni neniam faru du aferojn samtempe. „Kion mi faras, mi faras sola" diris prave JAN DE WIT". „Kiu volas konservi sian oficejon, devas teni sian oficejon" instruas al ni LUBBOCK. Ne koncernas kiun oficon oni plenumas, sed kiel oni ĝin plenumas. Oni ne bezonas noti ĉiujn malgrandajn elspezojn, sed oni ne lasu nenotita

elspezitan monon. Oni faru kiel eble plej malmulte da ŝuldoj, kaj, se oni ne povis lasi tion, oni pagu ilin tre baldaŭ. Ludŝuldojn oni neniam faru; la preciza homo ne hazardludas kaj ne spekulas.

Naŭe apartenas al bona karaktero:

KURAĜO.

Kuraĝo ne estas la propreco de tiu, kiu senpripense ludas kun propra vivo kaj kun tiu de aliaj, sed la propreco de tiu, ki- kun la danĝero antaŭ siaj okuloj faras sian devon, ne lasante sin deteni pro tio. Timo estas malbona konsilanto. Ofte ĝi kondukas al singardeco, sed oni povas esti singarda sen timeco. Kuraĝo ne sole estas la kuraĝo morti, sed ankaŭ la kuraĝo vivi kaj suferi pro realigo de idealo. La vera kuraĝo kviete atendas kaj ne agas nenecese. Kuraĝeco ne konsistas el la serĉo de danĝeroj, sed en la malcedo al danĝeroj, kie oni povas helpi aliajn. Bonvola kuraĝo estas la vera kuraĝo. La milito ne estas necesa por vivigi la kuraĝon; la akcidentegoj de l' naturo sufiĉas. Neniam diru, ke vi ne duelos; ĉiam estas homoj, kiuj faras malbonuzon el tio. Malsaĝa kuraĝo ne estas kuraĝo. Ne estu aŭdaca. Ne kuraĝu kio estas malpermesita. Aŭdaco estas malbone lokita kuraĝo. Kuraĝo je la kostoj de l' suferado de homoj aŭ bestoj, estas krima kuraĝo.

GAJECO.

„Vi devas havi gajecon en vi mem, se ne, vi eĉ en la ĉielo ne trovos ĝin" estas vera diro de l' moralistoj. Gajeco nepre apartenas al la moralo. „Lernu suferi sen plendi", diris iu germana imperiestro. La plej granda arto estas suferi kaj tamen esti gaja. Malbona humoro estas fenomeno de malsano, sed oni ne rajtas suferigi alian pro tio. Sana homo estas gaja, sed ankaŭ artefarite oni povas kreskigi la vivemon. Ĉiu homo malhavas multon, sed ankaŭ havas multon. Unue li posedas la vivon, kiu estas granda trezoro, se oni

Nr .....
FILIA Nr 14
w Białymstoku

faras bonan uzon el ĝi. Neniu volus ŝanĝi kun alia, se la interŝanĝo devus esti kompleta. Kie estas ombra flanko, tie ankaŭ estas lumflanko. Gajeco ne bezonas esti supermezura gajeco, sed la kvieta gajanimeco, kiu estas necesa por plenumi sian devon. Oni rekonas la homojn, laŭ ilia rido. Malbonuloj neniam ridas, bonuloj ridas kore. Kompreneble, oni ne estu ĉiam gaja, sed oni ne malĝoju senkaŭze. Internatestro parolis sinsekve kun du el siaj lernantoj; la unua diris esti farinta belegan promenadon, la alia diris esti farinta malbelan promenadon; pruviĝis, ke ambaŭ estis promenintaj la saman vojon! Nur koncernas kiel oni rigardas.

Gaja vivkompreno ankaŭ por la korpo estas saniga. Oni pli gajanime promenas, oni pli bonguste manĝas, oni dormas pli kviete. Sed super ĉio, ĝi favore efikas al propra rondo; nenio estas pli komunikema ol gaja animo. Ofte estas malfacila esti gaja, sed estas rekompencanta peno. Gajaj homoj estas ĉie bonvenaj.

Al gajeco multe kontribuas, ke oni ne superlaboras. Kiu multe volas labori, ne devas tro multe labori. Superlabori estas malbona por la laboranto kaj por la laboro, kaj ĝi forprenas la vivamon.

Ankaŭ oni ne ĉiam serĉu plezurojn kaj ne lasu sin gajigi de aliaj. La arto estas gajigi sin mem.

Al ĉiu karaktero ankaŭ apartenas:

VOLFORTO.

Ĉar konstanteco estas necesa por fari el nia principo nian karakteron, ni bezonas la forton por daŭrigadi tiun principon. Kiu ne posedas tiun forton el propra naturo, povas kaj devas ĝin akiri per ekzercado. Jen sin montras la granda utilo de malprosperoj. La tielnomitaj Dimanĉinfanoj sin trovas tie ĉi en la plej granda maloportuneco. Estas tiuj homoj, al kiuj ĉio prosperas; estas tiuj, kiuj dum infaneco estas tro dorlotitaj, doninte al ili ĉiam kontentigon; estas tiuj, kiuj pro sia agrabla mieno dum infaneco estis rigardataj ĉarmaj, eĉ kiam ili faris nenion, kaj kiel plenaĝuloj ĉie estas bon-

venaj kaj enkondukataj, dum oni forigas por ili ĉiujn barilojn. La plej malgranda malprospero konfuzas ilin kaj haltigas ilin, dum ĝi homojn kun forta volo incitas al pligranda streĉado. Nur pro la batalo kontraŭ la naturo, la korpo, nur pro la batalo kontraŭ la malprosperoj, la karaktero fortiĝas. Tiel ofte oni vidas la malpli privilegiitojn pro sia granda karakterfirmeco superi la pli privilegiitojn.

La volforto estas la fera ligilo, kiu starigadas nian principon kaj kuntiras la substancojn de nia karaktero. Nia karaktero ne nur estu bona, sed ankaŭ forta, se ne, ĝi ne restos bona. Kie estas la volo, tie estas la vojo, kondiĉe, ke la volo estu el fero. Volforton oni ne povas trograndigi; neniam oni posedas tro multe el ĝi. Estas la fera pugno, kiu ĉirkaŭprenas nian vivkondukilon. Estas la forto, kiu regnas nian spiriton, aplikata al nia volo. Volforto faras BISMARCK-, ZEPPELIN-, NANSEN- kaj COLUMBUS-ojn, kaj ĉion, kio sin levas super la ordinaro. Certe, estas malsaĝa batali kontraŭ ventmueliloj aŭ kuri kun la kapo al la muro, sed oni devas remi kontraŭ la fluo, por fariĝi viro aŭ virino el karaktero. Restari post ĉiu falo, konsideri ĉiun malprosperon kiel benon kaj ĉiun malsukceson kiel lecionon, jen la vojo por akiri la premion sur karakterkampo. Kiu ne konas maloportunaĵojn, ilin serĉu por hardi siajn fortojn. Superi malhelpojn estas vivkondiĉo por la volo. Ankaŭ bona karaktero ne povas ekzistadi sen volforto.

Al ĉiu karaktero krome apartenas:

PACIENCO.

Pacienco estas la forto por atendi. Sen pacienco oni ne povas persistadi sian principon. Kiu grenon volas rikolti, devas lasi al ĝi tempon por maturiĝi. Kiu akcelas la laboron de l' naturo, ĝin malbonigas. La pacienculo plenumas siajn studojn, dum la malpacienculo jam longe estas en la socio, sed ne koncernas la demandon kiam, sed kiel oni eniras la socion. Kiu deziras fortikan konstruaĵon, devas atendi ĝis ĉiuj fundamentoj estas metitaj. Pacienco konstruis preĝejojn kaj fosis ĉiujn minojn. La arto por sukcesi estas: scii kiel

longe oni devas atendi. Multaj malsukcesas pro sia malpacienco. Kiu ne vane volas vivi, ne devas esti malpacienca. Pacienco neniom rilatas kun malrapideco, sed nur kun longa laborado. Oni laboru ne malrapide, sed longe, sen superrapideco. Superrapideco ĉiam estas malbona.

Al bona karaktero apartenas:

HONESTECO.

Pli bona estas neesti ol esti malhonesta. Oni nenion deprenu de iu ne redonante ion similvaloran. Ankaŭ kontraŭ societoj kaj kontraŭ la ŝtato oni estu honesta. Pro la kontrabandado kaj la impost-evitado oni rekonas la malhonestulojn. Oni povas ankaŭ esti malhonesta, ne ŝtelante aŭ ne trompkaŝante. Ankaŭ sur financa kampo oni devas doni al ĉiu tion, kion tiu rajtas. Honesteco estas bonvoleco sur financa kampo.
Ne ĉiam malhonesteco estas punebla. Ekzistas okazoj de plej ekstrema bezonego, en kiuj eĉ la punkodo fermas la okulojn. Ŝtelo pro malsato estu ne punata. En ĉiuj ceteraj okazoj, oni tamen estu absolute honesta, kiel ajn malfacila tio estu. Ĝuste, ĉar honesteco povas esti tiel malfacila, ĝi estu enpenetrigata de tiu, kiu aliajn aŭ sin mem edukadas. Ies mono estu sankta al vi. La rentojn de ies mono, vi ne rajtas. Estas malhonesta noti elspezojn por aliaj, kiujn oni ne faris. Oni ne intermiksu la monon de aliaj kun la sia. Estas nepermesita pagigi de iu pli ol la liverita servo valoras.
La malliberejoj estas plenaj pro malhonestuloj. Se oni estus enpentriginta honestecon en ili dum ilia juneco, ilia nombro estus multe pli malgrava. Sed la plejmulto el la malhonestuloj estas ekster la malliberejo. Estas tiuj, kiuj kunigas malhonestecon kun ruzeco, kaj zorgas, ke ili ne estu punataj. Envieblaj tiaj homoj ne estas. Ilia monkofro estu pli plena, iliaj financaj zorgoj estu pli malgravaj, sed ilia feliĉo nepre ne estas pli granda ol tiu de aliaj kaj la interna kvieteco, kiu estas la fundamento de ĉtu feliĉo, mankas tute ĉe ili.
Sed ne pro propra profito ni estu honestaj, sed ĉar ni ne povas deziri, ke aliaj suferu pro nia kulpo; ĉar la financajn

zorgojn, kiujn ni mem deziras eviti, ni ne volas meti sur aliaj; ĉar bonuloj preferas malfeliĉigi sin mem ol malfeliĉigi aliajn. La malhonestulo, kiu ankoraŭ posedas iometon da honesteco, hontadas. Ni ne kaŭzu al aliaj kion ni mem ne volas subiri.

Al bona karaktero ankaŭ apartenas:

VERAMO.

Kiam ZOLA skribis sian „J'accuse!" li estis granda pro sia veramo, ĉar ĝi estis en la servo de l' justeco. Sed neniam li estus povinta skribi tiun artikolon, se li ne estus dediĉinta sian tutan vivon al la vero. La vero estas la nemankinda piedestalo de l' justeco. Oni ne faru malbonuzon el ĝi, devigante iun publikigi kion estis dirita al li konfidencie aŭ komunikante kio povus efiki malbonon, sed krom tio oni ĉiam apliku la veron. Neniun oni povas konfidi, pri kiu oni ne scias kun certeco, ke li neniam diras malveraĵon. Pro tio veramo estas ne mankinda en la socio. Por veramo oni bezonas kuraĝon, kaj por kuraĝo spiritforton. Tio ekskuzigas mankon de veramo de malfortaj karakteroj. Sed tio ankaŭ kaŭzas, ke malfortaj karakteroj ĉion eblan devas fari por pli fortigi kaj pli kuraĝigi sin kaj eduki la veramon. Veramo ne nur konsistas el tio, ke oni ne mensogas, sed ankaŭ el tio, ke oni ne tro grandigu, kaj ankaŭ el tio, ke oni ne rakontu duonan veron.
Ekzistas homoj, kiuj estas tiel bonaj kiel anĝeloj, sed kiuj al aliaj ĉiam diras krudaĵojn, pro pura veramo. Tio pruvas, ke oni ne devas trograndigi la veramon. La veramo devas sin movi inter la limoj de l' amo por la najbaro, tiel kiel ĝi devas sin movi inter la limoj de l' dececo. Laŭte pensi tute ne estas ĉiam permesata. Ami la veron signifas, ke oni malamas ĉiujn malverojn, sed ne, ke oni ĉiujn verojn diru. Trograndigita veramo degeneriĝas en malamindeco kaj malmoraleco, kaj en la mondo oni nur celu bonecon kaj dececon.
Havi amikon, kiu diras al vi la veron, estas feliĉego, kiel amikeco per si mem estas feliĉego. Sed diri la veron devas okazi laŭ amika maniero, ne pro malamemo aŭ incitemo.

Devas okazi por plibonigi kaj tiam estas granda privilegio, ĉar pri ĉiu multa malbono estas dirata post lia dorso, sed malofte ĝi okazas antaŭ ies vizaĝo. Tamen tiu ĉi lasta maniero estas tre bona por plibonigi ies mankojn, kaj homoj, kiuj volas esti bonaj, estas dankemaj, se oni ilin amike atentigas al iliaj mankoj.

Cetere apartenas al bona karaktero:

JUSTECO.

Doni al ĉiu kion li meritas kaj, en la plej ekstrema bezonego, kion li bezonas, tio estas justeco. Ne nur la ŝtatoj, sed ankaŭ la homoj devas esti justaj. Ĉiu volonte estas juste traktata, sed multaj ne pripensas, ke ili aliajn devas juste trakti. Ne tro multe plendu pri maljusteco, sed estu justa. Kune dissemu la semaĵon de l' justeco! Ju pli granda la grenkampo de l' justeco, des pli la malbonherbo de l' maljusteco malaperos. La justeco estas ja tiel maldense semita; ĝuste pro tio ni devas helpi ĝin semi.
La justeco staras pli alte ol la leĝoscienco. Ĝi estas la fonto, el kiu tiu scienco fluas. La leĝoscienco estas la apliko de l' justeco al la privataj statoj en la socio. Pro tio la justeco devas tiel esti praktikata kiel la leĝoscienco. Oni donu al ĉiu kion li meritas. Ofte oni juĝas kaj traktas la homojn ĉe ilia vivo laŭ ilia mieno kaj post ilia morto laŭ ilia internaĵo; ankaŭ dum ilia vivo oni juĝu kaj traktu ilin laŭ ilia internaĵo, tio estas justa.
La justeco postulas, ke oni rekompencu la bonecon, tute egale ĉu oni mem aŭ alia persono ĝin spertas. Ĉe tio oni ne atentu la sekvon de l' ago aŭ la agon mem, sed la principon de l' ago. Ne la bonfaro, sed la bona volo devas esti rekompencata. Tiel ankaŭ postulas la justeco, ke oni punu la malbonecon, ĝis kiom oni rajtas puni, sed neniam pli ol estas meritita. Ne la malbona faro, sed la malbona volo devas esti punata. La malmoleco, kiu kuŝas en la justeco, ne forprenas ĝian belecon.
La justeco ĉie estas la sama, kvankam ĝia apliko diferencas. Justeco estas la plej bela homa eltrovo, ĉar ĝi plenumas

ĝenerale ekzistantan kaj profunde sentatan bezonon. Ĝi anstataŭas la rajton de l' pliforta per la rajto de l' merito. Ĝi agas ne konsiderante, sed travidante la personon. Ĝi traktas la homojn nur laŭ tio por kio ili estas respondaj: ilia volo. La Romanoj nomis la justecon la volo por doni al ĉiu lian rajton; tiu difino estas bona, kondiĉe ke per „rajto" oni komprenu „meritita gajno".

Cetere apartenas al bona karaktero:

SERIOZECO.

Estas homoj, kiuj ĉiam farsas. Estas homoj, kun kiuj oni neniam povas paroli seriozan vorton. Estas homoj, pri kiuj oni neniam scias ĉu ili estas seriozaj aŭ farsemaj. Ili estas homoj, kiuj sian tutan vivon restas infanoj. Certe, estas bona havi sunan senzorgan junecon. Junulo ne kondutu kiel maljunulo, same kiel juna viro ne kondutu kiel maljunulino. Certe, junulo ne devas esti enuiga, sed tamen junuloj komprenu, ke en la juneco oni metas la fundamenton por la vivfeliĉo, kaj, kio ankoraŭ pli enhavas, por la karaktero. Ili komprenu, ke en unu tago ili povas detrui sian sanecon. Ili konsciu, ke gajeco povas kuniri kun seriozeco. Ili fariĝu simpatiaj homoj, kun kiuj oni povas pritrakti seriozajn subjektojn. Ili ne fariĝu la klovnoj de societo aŭ stratorgeno de farsaĵoj. Gajna sed serioza vivkompreno estas la fundamento, sur kiu la vivo de l' homo devas esti konstruata. Tio ne elfermas fari farsaĵojn, sed seriozeco restu regulo. Eĉ kiam la juneco faras malsaĝaĵojn, ĝi devas sin gardi kontraŭ trograndigo aŭ malbone lokita farseco. Dumvive oni konsciu, ke la vivo estas serioza afero.

Al bona karaktero ankaŭ apartenas:

SIMPLECO.

Simpleco ne nur estas la provilo de l' vero, sed ankaŭ de l' civilizacio. Civilizita homo restas simpla, eĉ kiam li riĉiĝas.

La defluo de l' malprospero kelkfoje donas lokon al la alfluo de l' prospero. Fortaj kruroj estas necesaj por resti staranta en tiu fluo. Multaj lasas sin fortreni per tiu nekonata fluo. Ili dislasas siajn malnovajn konatojn. La arĝenta horloĝoĉeno estas anstataŭata per ora. La plej delikata pelto estas portata tuj kiam la termometro nur iom malleviĝas. Eĉ en siaj ĉambroj oni venas kun sia pelto.
Oni aĉetas vilaon. Oni provizas sin per ekipaĵo aŭ aŭtomobilo. Oni klopodas edzinigi sian filinon en la tielnomita granda mondo. Oni provas liveri al sia filo nobelan titolon. Oni fariĝas parvenuo. Oni disĵetas la monon. Oni malŝatas siajn kunulojn, kiuj ne prosperas. Oni faras nenecesajn banvojaĝojn. Oni fanfaronas pri sia riĉeco. Oni ne plu restas si mem. Oni forgesas, ke kiu volas resti civilizita, ĉiam devas konservi sian simplecon. Oni ne povas superi, se oni ne en ĉiuj cirkonstancoj estas simpla.

Al bona karaktero ankaŭ apartenas:

MEMFIDO.

Memfido estas la konfido en propra forto. Ĝi apogas sur la kredo, ke oni, kun bona principo, per propra forto, povas veni inter limoj atingeblaj por homoj kie ajn oni volas. Ĝi estas nemankinda por bona plenumo de nia tasko. Ni ne permesu, ke oni ĝin deprenu de ni, kaj neniuokaze ni deprenu ĝin de iu alia. Ĝi instruas al ni uzi ĉiujn niajn fortojn kaj streĉi ilin ĝis la fino. Ĝi faras nin sendependa de l' kunlaborado de aliaj kaj nesentemaj por la kontraŭagado de aliaj. Ĝi lasas nin konservi la kuraĝon ĉe kontraŭvento kaj senvenţeco. Ĝi faras nian sendependecon. Memfido alkondukis COLUMBUS al Ameriko, PEARY al la Norda Poluso, SHACKLETON al la Suda Poluso kaj SVEN HEDIN en Thibet. Memfido veturigis ZEPPELIN tra la aero kaj BLÉRIOT trans la Kanalon. Memfido kondukis ĉiujn malkovrojn kaj aplikigis ĉiujn eltrovojn. Memfido estigis la ŝtatojn kaj ekzistadigas ilin. Memfido protektas niajn limojn. Popolo, kiu fidas pri si mem, estas malfacile venkebla kaj ne estas facile atakata. Memfido estas la fundamento de nia sendependeco.

Al bona karaktero cetere apartenas:

PATRUJAMO.

Patrujamo ne nur konsistas el tio, ke oni amas sian patrujon, sed ke oni bone traktu sian patrujon. Patrujamo ne nur konsistas el tio, ke oni scias morti por la patrujo, sed ankaŭ, ke oni scias vivi por sia lando. Patrujamo ne nur konsistas en tempo de danĝero, sed ankaŭ en tempo de sendanĝereco. Patrujamo ne konsistas el ekscititeco, sed en kvieta sindono. Patrujamo staras kontraŭ partiemo. Patrujamo ne egalas kun malamo por aliaj landoj, sed devas kuniri kun frata afekteco por, kaj frata trakto al, aliaj landoj. La plej alta patrujamo ne estas la zorgo por la intereso de l' lando, sed la zorgo por la honoro de l' lando.
Iu Amerikano, skribas SIENKIEWICZ, devis zorgi por lumturo sur insuleto apud la Amerika marbordo. Li serĉis lumgardiston por tiu sola loko. Maljunulo, kiu estis batalinta la Polan militon, petis la oficon kaj estis dungata. Li dum monatoj bruligis kaj estingis ĉiutage la lumon kaj ĝuis sian ripozon. Iam la lumgardisto ricevis librojn kaj inter ili unu pri la Pola liberecmilito. Li legas kaj konsumegas ĝin. En pensoj li ree batalas por sia lando. Li sonĝas pri sia juneco kaj pri sia gepatra hejmo. Denove li estas en sia amata Polujo. Li revivas en sia patrujo.
Mano estas metata sur lia ŝultró. Lia mastro staras antaŭ li kaj demandas ĉu li dormas. „Vi ne ekbruligis la lumon; ŝipo pereis; vi estas maldungita!" La patrujamo forgesigis al la maljunulo lian devon. Tio estas komprenebla, sed malbona. La patrujamo devas memorigi al ni nian devon. Ĝi devas memorigi al ni, ke ni devas vivi por aliaj, unue por tiuj, kiuj estas plej najbaraj al ni: niaj parencoj, niaj amikoj, niaj samlandanoj. Ne por niaj sampartianoj, sed por niaj samlandanoj ni unue devas vivi, kaj poste kiom eble plej multe por la fremduloj.
En ĉiu lando estas nur unu rekomendinda partio. Estas la partio patriota. Al tiu partio apartenas ĉiuj, kiu per vorto kaj faro amas sian patrujon, kiel ajn ili nomu sin. Al tiu partio nur ne apartenas tiuj, kiuj serĉas propran profiton, kaj ne ili, kiuj serĉas la profiton de samlandanoj je la kostoj de aliaj sam-

landanoj. Ne egoisto aŭ socialisto, sed altruisto devas esti nia devizo. Nur tiu, kiu subtenas tiun devizon kaj aliĝas al tiu partio, gvidas belan politikon. De ĉiu alia politiko oni tenu sin malproksima.

Al bona karaktero ankaŭ apartenas:

PACAMO.

La milito estas la plej granda malfeliĉego de l' homaro, ne nur pro la korpa kaj financa suferado, kiun ĝi kaŭzas, sed ankaŭ kaj precipe, ĉar ĝi ofte pravigas tiun, kiu estas malprava. La naturo alportas batalon, la civilizacio alportas pacon. BISMARCK diris: „sen batalo ne vivo"; li devus esti dirinta: „sen paco ne civilizacio". La sovaĝa homo volas batalon, la civilizita homo volas pacon. Estas la gloro de WILHELM II, ke li eĉ tie, kie minacis la plej granda militdanĝero, subtenis la pacon. Sed ankaŭ sen pacprinco la paco devas esti certigita. Pacamo ne estas nevira. Ne estas vira kaŭzi al iu suferon aŭ maljustecon.
Oni povas esti kuraĝa, ne estante militema; oni ne povas esti samtempe justa kaj militema. Oni estu pacama en la hejmo, en la socio kaj sur la mondscenejo. Ankaŭ la ŝtatoj estu justaj kaj pro tio pacamaj. Nur en la paco oni povas apliki siajn virtojn, plivastigi sian konon kaj ĝui sian feliĉon. En la pasinteco oni ne estis pacama kaj la sovaĝuloj ne ankoraŭ estas tiaj; nun ni estas sufiĉe civilizitaj por esti pacamaj. La milito estas malnoviĝinta. La milito ja fariĝis tiel multekosta, ke la venkinto tamen perdas.
Certe patrujamo kaj justeco staras pli alte ol pacamo. En tempo de urĝeco ni devas defendi nian landon kaj por justa afero, se necesa, ni batalu; sed ni ne batalu nenecese, kaj feliĉe la milito ne plu estas necesa. Ĉiu ŝtato nun povas akiri sian rajton sen milito, ĉiu lando povas sin defendi minacante per milito. Ni devas esti armitaj, sed pacamaj. La kortumo de arbitracio ne povas dissolvi ĉiujn malkonkordojn, sed ĝi faras ĉiun batalon nenecesa. Pacamo trahakigas la nodon, kiu ne povas esti diskonfuzata. Pli bona estas armita paco ol milito.

La armita paco certe ne estas idealo, eĉ nur pro siaj enormaj kostoj, sed sen la armiloj la paco ne estas subtenebla. Ankoraŭ ĉiam estas vera: „kiu volas la pacon, preparu sin por la milito", kaj ankaŭ la rajto inter la ŝtatoj en lasta instanco estu subtenata per la armeo. Nia idealo estu: unu komuna armeo por subteno de paco kaj rajto inter la ŝtatoj. Tiam por la ŝtatoj nur estas bezonataj malgrandaj apartaj armeoj por subteno de paco kaj rajto inter propraj limoj. La kortumo de arbitracio nenecesigis la militon; la komuna armeo devas malebligi la militon.
La pacamo komencas en la lernejo. Lasu la knabojn batali, tio donas al ili kuraĝon kaj spiritforton. La naturo havu ankaŭ sian disvolviĝon. Sed poste la batalado finiĝu. Kun la malmoleco malaperu la batalemo. Militemaj knaboj iom post iom fariĝu pacamaj viroj. La edukado ne nur devas fari virojn, sed ankaŭ civilizitajn virojn. Ne pro timo, sed pro bonvoleco kaj justeco, kaj ankaŭ pro memrespekto oni lasu la batalon. La juneco ekvidu, ke la milito estas necivilizita.
Malamu la militon, ĉar ĝi disvastigas nekalkuleble multe da doloro, sufero, malriĉeco kaj maljusteco. Kontraŭ la kuraĝo, kiun ĝi kreskigas, estas la krudeco, kiun ĝi naskas. Amu la pacon, ĉar ĝi disvastigas prosperon. La milito estas la sanga batalkampo, la paco svinganta grenkampo. Feliĉa la lando, kiu loĝigas la pacpalacon! Honoru la ideon pri arbitracio. Disvastigu la veron, ke la arbitrantoj elektitaj de la ŝtatoj, ne forprenas la aŭtonomion de l' ŝtatoj. Memorigu ĉie, ke la eldiroj de l' arbitrantoj ĝis nun, ankaŭ sen plenumanta povo, ĉiam estas obeitaj. Batalu por paco per rajto!

Al bona karaktero ankaŭ apartenas:

TOLEREMO.

Oni ĉion toleru, krom la netoleremo. La leĝofaristo proklamu netoleremon ĝis krimo. Tiu, kiu per vorto aŭ faro instigas al netoleremo, estu minacata per mallibereja puno de ne pli ol unu jaro. Tiam la sinjoroj predikantaj netoleremon tion dekutimos. Tiuj, kiuj predikas la netoleremon, estas danĝer-

uloj, kvankam cetere ili estu tiom bonaj. Oni reciproke toleru, ankaŭ alipensulojn.

Al bona karaktero ankaŭ apartenas:

KONTENTECO.

Oni estu kontenta pri la loko, kiun oni okupas; ĉiam ekzistas homoj, kiuj havas pli malbonan sorton. Kontenteco ne elfermas la celadon al sortbonigo inter la limoj de rajto kaj leĝo. Kontenteco elfermas: forpuŝi iun de ties loko por ĝin mem okupi. La progreso de l' mondo ne estas ŝuldata al la malkontenteco, sed al la bonvoleco kaj seninteresèco de kelkaj grandaj pensuloj. Semantoj de malkontenteco estas danĝeruloj; aliajn ili igas malfeliĉaj kaj malbonaj.

Al bona karaktero ankaŭ apartenas:

BONMANIERECO.

Bonmaniereco estas tio, kio faras sinjoron el viro kaj sinjorinon el virino. Bonmaniereco estas ĉio tio, kun kio oni efikas agrable al alia, ne nepre postulata de la ĝentileco. Malbonmaniereco estas ĉio tio, kun kio oni malagrable efikas al alia, ne estante nepre malĝentila. Bonmaniereco estas la lasta raboto per la rabotilo, kion civilizito ricevas dum sia edukateco. La bonaj manieroj ne ĉie estas samaj, sed en principo ili estas tiaj.
Ekzistas dekoj da manieroj, per kiuj oni povas esti bonmaniera, kaj centoj da manieroj, per kiuj oni povas esti malbonmaniera. Ne estas ebla citi ĉiujn bonajn kaj malbonajn manierojn. Oni povas nur citi ekzemplojn, ne plu. Kiu dum sia juneco ne lernis bonajn aŭ malbonajn manierojn, imitu iun, kies manieroj agrable impresas. Bonmaniereco neniel rilatas kun nenatureco; ĝi ne estas ŝajno, sed realeco. Bonmaniereco ne estas la plej precipa parto el la karaktero, sed jes la plej ofta parto.

La fundamento de bona karaktero estas:

SPIRITFORTO.

Estas ja ne alia en la mondo: Kiu faras sin ŝafo, estas englutata de la lupo; kiu faras sin muso, estas ekkaptata de la kato; kiu faras sin vermo, estas dispremata de la pasanto. Oni ne estu nur bonvola, sed ankaŭ firma. El nur bonvoleco oni faras trouzon. Nur firmeco kondukas al krimo kaj malfeliĉo. Kombinitaj ili kondukas al utila kaj feliĉa vivo. Spiritforton oni ofte konsideras karaktero, sed ĝi nur estas ĝia spino. Plej bona estas esti bonvola, kaj ne pli ol necesa rimarkigante tion.
Spiritforto ne nur estas bezonata por memdefendo, sed ankaŭ por helpi aliajn. Kiu aliajn volas helpi de el la premado, zorgu, ke li mem restu staranta. Kiu naĝante volas savi drononton, zorgu, ke li mem naĝu supre. Bona viro ne nur zorgu esti bona, sed ankaŭ viro. La malfortaj arboj estas teren blovataj, eĉ malgraŭ ili havas bonajn fruktojn. Oni ne povas fari bonon, se oni ne estas forta. Nur fortuloj povas aliajn savi el la mizero. Nur fortuloj povas aliajn subteni. Forta korpo estas granda helpilo por spiritforto, sed forta spirito povas ankaŭ loĝi en malforta korpo.
Ekzemplo de bona karaktero estas generalo BOOTH, kies religian konvinkon mi lasas ekster priparolo. Pro la fondo de sia savarmeo, li montris kompreni, ke oni devas esti forta por helpi. Lia spiritforto estas tiel granda kiel lia bonvoleco. Ekzemplo de malbona karaktero estas NAPOLEONO I, kies eksterordinare grandan talenton mi ne pridiskutas. Pro sia konstanta militado, li multmilojn da homoj igis suferi kaj morti. Lia irado trans la Alpoj estas majstraĵo de spiritforto, sed ekzemplon de lia bonvoleco mi ne konas. Grandeco ne ĉiam povas kuniri kun boneco.
Spiritforton oni bezonas por resti staranta en la batalo de l' vivo. Meze de l' favorado de la mondo, ĉirkaŭataj de egoistoj, starantaj en maro de maljusteco, nia spiritforto devas esti la roko, sur kiu nia principo kviete staras. Sen spiritforto mankas al ni la kvieteco necesa por nia ĉiutaga tasko. Kun spiritforto ni konservas kuraĝon en ĉio kio okazas al ni. Spiritforto estas la puŝforto, el kio ĉiam nova vivkuraĝo elspruĉas. Ĝi persistigas nin, kie aliaj falas. Ĝi portigas

de ni la malprosperojn, kiuj de neniu estas forprenataj. Ĝi donas al ni vivemon kaj mortkuraĝon.

FINO.

Ĉio devas havi finon, do ankaŭ la citado de bonaj karakterproprecoj. La listo, kompreneble, ne estas kompleta, sed mi opinias esti citinta la plej precipajn substancojn de bona karaktero. Ekzistas ekzemple ankoraŭ la neelspezemo kaj la ŝparemo, sed mi volis min teni malproksima de ĉio materia. Per kelkaj vortoj mi volis fari disponebla por la publiko rigardon en ĝia propra interno, kia tio estas kaj povus esti. Per kelka vorto mi volis instrui al miaj kunhomoj kaj speciale al la junuloj, meze de ĉiuj instigoj por fariĝi kiel eble plej kleraj kaj kiel eble plej multe gajni monon, ke ekzistas ankoraŭ pli inda vividealo: esti kiel eble plej bona.
Tiu idealo estas por ĉiu atingebla, kiu havas impreseblan animon kaj sanan rezonemon. Ofte estas tre malfacila, sed neniam malebla. Tiu ĉi libreto instruu al la junularo tion, kion ili alie lernus per malprofito kaj honto! Ĝi instruu al la junuloj, ke oni neniam lasu gvidadi sin per la cirkonstancoj, sed ke oni iru tra ili sian propran noblan vojon! Ĝi instruu al ili, ke altruista vivo ĉiam kaj ĉie estas la plej bona!
Ilin, kiuj deziras pli scii pri tiu ĉi subjekto, mi direktas al la verkoj de SMILES, MARDEN kaj LUBBOCK, kiuj instruas, ke sur la mondo ne estas io pli bela ol bona karaktero kaj ne pli utila ol ĝia formado.

Hago, Decembro 1911.

J. M. VAN STIPRIAAN LUÏSCIUS.

KSIĄŻNICA PODLASKA
im. Łukasza Górnickiego
Nr 1914
BIBLIA Nr 14

ENHAVO.

	Paĝo.
Enkonduko	3
I. Kio estas karaktero?	3
II. Kiel formas oni karakteron?	5
III. El kio konsistas bona karaktero?	7
1. Bonvoleco	7
2. Ĝentileco	11
3. Devokonscio	11
4. Modesteco	12
5. Dankemo	13
6. Takto	13
7. Memregado	15
8. Precizeco	16
9. Kuraĝo	17
10. Gajeco	17
11. Volforto	18
12. Pacienco	19
13. Honesteco	20
14. Veramo	21
15. Justeco	22
16. Seriozeco	23
17. Simpleco	23
18. Memfido	24
19. Patrujamo	25
20. Pacamo	26
21. Toleremo	27
22. Kontenteco	28
23. Bonmaniereco	28
24. Spiritforto	29
Fino	30

Abonu je

„La Holanda Pioniro"

Oficiala Monata Organo
de la Holanda Societo Esperantista
„La Estonto Estas Nia".

Redaktata en Esperanta kaj Holanda lingvoj. Ĝi estas unu el la plej malkaraj naciaj Esperanto-gazetoj.

ABONPREZOJ:

NEDERLANDO	**fl 0.90**	**(0.750 Sm.)**
BELGUJO	**„ 1.—**	**(0.830 „)**
ALIAJ LANDOJ	**„ 1.20**	**(1.— „)**

Administrejo: Prinsestraat 48 - Hago
(Nederlando).

Elektra Presejo „Nova Vivo"
Paviljoensgracht 68-70, Hago.

Książnica Podlaska
im. Ł. Górnickiego w Białymstoku
KP-F14-0001914